

DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 3 (894) • 2012 •

Moderna preĝejo en Munkkivuori, Finnlando.
Arĥitekto: Olavi Kantele



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
☎ +420 325 615 651; ✉ polnicky@quick.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono:
pagante rekte al KELI €16,- • pagante al
Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj
per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto
(informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA
por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de
"KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale":

CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la tt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la redaktoro.*

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

En li estas vera paco	51
Tri personoj	55
Ekumena diservo en Herzberg	56
Enkonduko historia (1)	57
Henk de Hoog - Andreo Cseh 5	61
Kion rakonti al la melkistino	63
Bele maljuniĝi	64
Sekretaria raporto kaj tagordo	65
Financaj raportoj	66
Sankta semajno en Bonn	70
Informetoj	71
Pli pri Jesuo	71

REDAKTORAJ VORTOJ

Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis
Esperantan gazeton kun la temo
Ateismo. Kvankam mi ankoraŭ ne-
niun artikolon legis, la temo inte-
resigis min, ĉar antaŭ kelkaj semaj-
noj mi kaptis senpagan kaj jam
uzitan svedlingvan libreton *Kio estas
kristanismo*. Tiuj du influoj emigas
min prezenti diversajn artikoletojn
en sekvontaj numeroj pri nia kredo.
Nia dua celo en KELI estas “*per
Esperanto diskonigi la evangelion
pri Jesuo Kristo*”. Sed praktike –
kiam, kion, kiel kaj per kiuj mate-
rialoj aŭ informiloj ni diskonigas al
aliaj esperantistoj? Ĉu vi havas
ideojn pri tio? Kiel kutime mi petas
viajn kontribuojn.

Kaj havu bonan kaj belan some-
ron kun multaj interesaj esperanto-
renkontiĝoj (ne forgesu raportoj al
DIA Regno)!

En li estas vera paco

Prediko dum KELI-kongreso 2011

Pavel KLIMEŠ, CZ

kaj li venis kaj predikis pacon al vi malproksimaj kaj al la proksimaj; ĉar per li ni ambaŭ havas en unu Spirito alkondukon al la Patro. Sekve vi jam estas ne fremduloj kaj pasloĝantoj, sed samregnanoj kun la sanktuloj, kaj el la domanaro de Dio, konstruitaj sur la fundamento de la apostoloj kaj profetoj, kies bazangula ŝtono estas Kristo Jesuo mem; en kiu ĉiu aparta konstruaĵo, bone kunigita, kreske fariĝas sankta templo en Kristo; en kiu vi ankaŭ estas kunkonstruitaj por sanktejo de Dio en la Spirito.

Efe 2,17-22

Karaj gefratoj, tiel aspektas la eklezio de Kristo. En ĝi renkontiĝas homoj el diversaj nacioj kaj tipoj – kaj ĉiuj apartenas al ĝi. En tiu ĉi loko hodiaŭ kunvenas la komunumo de Ĉehfrata evangelia eklezio el Poděbrady kaj membroj de diferencaj ekleziaj komunumoj el tuta Eŭropo, kiuj estas unuigitaj en KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia). Ni devenas el diversaj lokoj de Eŭropo, ni parolas ĉeĥe kaj esperante, sed ni formas unu Dian korpon.

La eklezio estas tre stranga formo. Ĉiu homo estas alia, sed ĉiu apartenas al ĝi. Ĝi estas unika kunveno de Dia popolo, ĝi estas la instrumento de Dia aktivado en la mondo. En la Sankta Spirito, kiu regas en la eklezio, aŭ kiu devus regi en ĝi, kunligas sin individuaj bonaj ecoj de tiuj, kiuj la eklezion faras. En la 2-a epistolo de Petro ni legas:

“Kaj pro tiu sama kaŭzo viaflanke aplikante ĉian diligentecon, en via fido

aldonu virton; kaj en virto scion; kaj en scio sinregadon; kaj en sinregado paciencon; kaj en pacienco piecon; kaj en pieco fratamikecon; kaj en fratamikeco amon.”

Vi vidas: ĉiu nova virto eliras el la antaŭa kaj ĉiuj bone eniĝas unu en la alian.

Al ĝi apartenas tiuj, kiuj naskiĝis en eklezia medio, de infanaĝo en familioj ili renkontis la religion kaj fidon kaj tiel la kredo fariĝis parto de iliaj vivoj.

Al ĝi apartenas ankaŭ tiuj, kiuj ne kreskis en eklezio. Ili travivis diferencon edukadon, ekzemple en ĉeĥa medio ofte ateistan, kaj ne estis formitaj per kristaneco.

Sed Dio iris kun ili. Ili iris laŭ siaj vojoj kaj trovis novan ekkonaĵon. Ili trovis ion tute novan, ili trovis novan esperon en tio, pri kio socialisma lernejo diris, ke tio estas eraro kaj obskureco. Interne ili solvis malsimplan situacion: ili mem devis serĉi, recenzi, percepti kaj

akcepti. Sed neniam ili serĉis tute mem: ili nur akceptis la donacojn de la Sankta Spirito – kiel dirus kristano – aŭ akceptis la veron, pri kies aŭtentikeco ili konvinkis – kiel iam dirus ili.

Tiuj, kiuj kreskis en la eklezio, iam sentis sin kiel kaptitoj, ĉar ili ofte pensis, ke la fido de la gepatroj ilin limigas kaj kunligas. Pro tio ili ofte baraktis kaj volis sin liberigi. Bedaŭrinde sukcesis nur kelkaj kaj ili ĝis nun restas sen fido kaj kun fiereco en la koro. Aliaj el tiu ĉi grupo devis denove mem la fidon de siaj gepatroj travivi, por ke ili povus ĝin persone akcepti kiel donacon de la Sinjoro. Eble ili havis iam vojon pli malfacilan ol la unuaj.

El tio ni vidas, ke ne eblas la fidon bone heredi, sed la hereditan fidon eblas nur persone akcepti en la propra koro kaj kiel la plej noblan juvelon porti ĝin plu.

ne eblas la fidon bone heredi,
sed la hereditan fidon eblas nur
personale akcepti en la propra
koro kaj kiel la plej noblan
juvelon porti ĝin plu.

Do, tia estas la nuntempa situacio en nia eklezio kaj en niaj komunumoj. Simila situacio estas en la tuta mondo. Ni ĝoju pri tio, ke la Spirito Sankta tie ĉi blovas, kvankam eble ne tiel laŭte kaj grandioze kiel alie. Sed ni scias, ke tro granda ventego facile elradikigas la tutan arbon.

Tio, kion donas al ni la Sinjoro, kiel sian donaĵon, estas grandioza en si mem:

“Li venis kaj predikis pacon al vi malproksimaj kaj al la proksimaj,” diras pri tio la apostolo.

Sinjoro Jesuo Kristo alvenis kiel la vera Mesio. La popolo de la Biblio sciis de pratempo, ke li estos la donacanto de la paco, ke estos li, kiu instalos la pacon kaj komprenemon en la mondo plena de malpaco kaj malboneco.

Kiam la profeto Jesaja anoncas Mesion kaj antaŭdiras lian alvenon kiel malgranda infano – kaj ni legas tiun ĉi fragmenton en adventa tempo – li donas al la infano ne nur titolojn kiel *“Mirinda, Konsilisto, Potenculo, Patro de Eterneco”*, sed ankaŭ *“Princo de Paco”*.

Kaj li promesas, ke *“por pligrandigi la regadon kaj por paco senfina sur la trono de David kaj en lia regno, por fortikigi ĝin kaj fortigi ĝin per justeco kaj vero de nun ĝis eterne”* (Jes 9,7)

Ĝuste li, la sanktoleita Savanto, alportos pacon al malproksimaj kaj al proksimaj. Al tiuj, kiuj estis en komunumo naskitaj kaj ankaŭ al tiuj, kiuj ĝin nur nun trovas.

La aŭtoro de la epistolo al Efesanoj tiel argumentas ankaŭ por prospera vereco de Krista mesianismo.

Kristo estas nia paco, li estas donacanto de kvieto. En tiu ĉi konscio de Krista kvieto kaj libereco, ni ĉiuj povas, proksimaj kaj malproksimaj, komune antaŭenpaŝi antaŭ la Dian vizaĝon kiel antaŭ la vizaĝon de nia Patro. En Kristo jam ne estas diferenco inter hebreo kaj pagano, kaj ne estas diferenco inter tiu, kiu devenas el ia religie tre bona gento kaj tiu, kiu de nun fariĝis nia frato aŭ fratino. Ni ĉiuj estas unu en Li kaj kun Li. En la spaco de Krista savo ĉio

refandiĝas kaj nove naskiĝas. Malnovaj barieroj kaj pratempaj muroj detruigigas kaj gefratoj estas proksimaj unu al alia. Tia estas la laboro de Jesuo Kristo, kiu aldonas kvieton al tiu ĉi mondo. Dankon al Dio pro tio!

Karaj gefratoj, ni nun perceptas niajn proksimumojn iomete alie. Malantaŭ ni estas du miljaroj de kristaneco kaj ni havas ankaŭ demokratian edukadon. Ni jam scias, ke ni ne rajtas rigardi la alian homon de supre. Sed ni bone scias ankaŭ tion, ke ni tamen senhonte faras tion, ĉar iuj homoj ne estas unuavide laŭ nia imago.

Ĉiu el ni havas kelkajn amikojn kaj proksimumojn kaj ni havas ankaŭ iom da malamikoj kaj homoj, kun kiuj ni tute ne volas kontaktiĝi. Kaj ni moviĝas inter tiuj du polusoj. Krom tio ekzistas ankaŭ la homoj neŭtralaj, kiuj nin ne interesas. Ni ĉefe diras “griza zono”.

Ankaŭ por antikvaj homoj ekzistis amikoj kaj malamikoj. Ĉiu Izraelano

sciis, ke ĉiuj Samarianoj estas malamikoj. La griza zono tiam preskaŭ ne ekzistis. Biblia homo bezonis havi klarecon en rilatoj. Li bezonis scii, kio estas nigra kaj kio estas blanka. Li bezonis scii, kun kiu li rajtas sidiĝi al la tablo, al kiu li ne rajtas doni la manon, kiun li rajtas saluti kaj beni per la nomo de Eternulo aŭ kiun li eĉ ne rajtas saluti.

Tia taksado estas tre skema, ofte maljusta kaj malpreciza. Ni rememoru, kiel surpriza estis por aŭskultantoj la rakonto pri la favorkora Samariano. Tiu ĉi parabolo de Jesuo kaŭzis novan rigardon je rilatoj inter du malamikaj nacioj. Ja tio estis la Samariano, kiu kondukis kiel proksimumo, ne la samgepatra frato.

Sed ni konfesu, ke ankaŭ ni havas ofte tendencan al nigra-blanka rigardo. Kaj poste ni estas surprizitaj, kiam ni eklernas, ke ĉio estas tute alia, ol ni atendis. Tio estu por ni instruo, ke ni ne prijuĝu homon laŭ lia jako aŭ lia parolo, sed laŭ lia koro.

Pavel Klimeš dum la KELI-kongreso



En la Dia popolo la fremduloj kaj emigrantoj havis specialan pozicion. La juro de Israelo ilin ne rilatis, sed ili ĝuis ian ĝeneralan protekton, se ili ne apartenis al ia grupo, kiu estis rigardata tute malamika.

Nun diras la epistolo al Efesanoj ion tute novan: *“Vi jam ne estas fremduloj aŭ eksteruloj, vi havas rajton de Dia popolo kaj apartenas al Dia familio.”* Per tio, ke Jesuo Kristo anoncis pacon kaj kvieton, ke li disbatis la muron, kiu dividis homojn kaj mondon, ke li nuligis senbezonan dividon en la socio, jam ankaŭ vi apartenas al la Dia familio.

Ĝis hodiaŭ oni diras, ke familio estas la fundamento de ŝtato. Kaj por antikvo tio funkciis multfoje. Tiu, kiu estis membro de ia familio, havis certan protekton. Kaj esti membro de Dia familio, havi aliron al la Patro, tio estas vere grandega protekto kaj grandega proksimeco, tio estas vere grandega progreso.

Jesuo Kristo estas la bolto, kiu en unu Spirito kaj unu paco unuigas hebreojn kaj nacianojn, kiu unuigas ĉiujn homojn. Li instalas pacon inter Dio kaj homo. Homo jam ne estas la homo dividita, sed la homo kompleta kaj tute plena, la nova homo.

Tio, ke nun nacianoj kaj hebreoj povas libere aliri al la Patro Ĉiela, kaj ke tion peris Dia filo Jesuo Kristo, tio estas granda progreso, tio estas nekred-ebla ŝovo al la Dia graco, kaj ne nur por Efesanoj.

Karaj gefratoj, per senkulpiĝo en Jesuo Kristo eniras la homo en plene novajn kondiĉojn kaj li mem fariĝas la nova homo. Li jam ne gvidas sin, aŭ li

ne devus gvidi sin, per naivaj skemoj, sed li estas sentema por ĉiu alia homo. Ankaŭ ni scias, ke tio estas komplika, kiel facile nia pensado falas en skemojn, en la malnovan homon en ni. Sed ni vivas en la potenco de unueco de Sankta Spirito kun gefratoj. Ni estas kun ili unuiĝintaj en Kristo. Li pacigis nin kun ni kaj kun aliaj homoj reciproke. Ni fariĝas konstruaj ŝtonoj en komunumo de Krista eklezio.

La eklezio, kiun montras al ni la apostolo, estas la konstruado, en kiu fundamentoj estas apostoloj kaj profetoj kaj Kristo estas la bazangula ŝtono. Apostoloj alportas bonan sciigon pri savo en Jesuo Kristo, ili predikas Dian Vorton, instruas kaj gvidas. Profetoj, kiuj kun apostoloj, sekvantoj de la Sinjoro, edukas popolon en veroj de evangelio, tiuj staras en fundamentoj de konstruaĵo de la eklezio. Dia vorto estas firma ligilo de tiu ĉi konstruaĵo. Per tiu ĉi Vorto unuopaj ŝtonoj firmiĝas kaj fariĝas la parto de konstruaĵo.

Jesuo Kristo estas la bolto, kiu
en unu Spirito kaj unu paco
unuigas hebreojn kaj nacianojn,
kiu unuigas ĉiujn homojn.

Tia konstruaĵo estas ni ĉiuj. Malgrandaj ŝtonetoj, kuj formas firman konstruaĵon. Sed tiu konstruaĵo ne estus plena, kiam ne estus ĝia bazangula ŝtono, ĝia bolto, la Filo de Dio mem. Li certigas, ke la konstruaĵo staras. La bazangula ŝtono estas la lasta ŝtono, oni

diras la “volboŝtono“, kiu tenas la volbon, do la tutan konstruaĵon. En tiu ĉi konstruaĵo estas la ĉefa ŝtono tiu, kiu alportis al ni ĉiuj la esperon. Tio estas Li, kiu ofertis sin, por ke ni ne devu esti ofertitaj.

La Sinjoro Jesuo kreas sian eklezion kiel firman kaj certe ankaŭ belan konstruaĵon. Ja tiu konstruaĵo kreskas en la Templon, konsekrita en la Sinjoro. *“En kiu vi ankaŭ estas kunkonstruitaj por sanktemo de Dio en la Spirito.”*

Karaj gefratoj, en la 1-a epistolo de Petro ni legas: *“vi ankaŭ kiel ŝtonoj vivantaj, konstruiĝas domo spirita, sankta pastraro, por oferi spiritajn oferojn, akcepteblajn de Dio per Jesuo Kristo.”* (1 Pet 2,5)

Vi estu vivantaj ŝtonoj! Tio estas bona invito por vivanta kristano. Por ke ni tiaj estu, tio ne estas nia merito. Tio estas agado de la Sankta Spirito, kiu nin ŝirmas kaj gvidas, por ke ni estus almenaŭ malgrandaj, sed vivantaj ŝtonetoj, almenaŭ sablero en mortero, kiu kunigas la mirigan Dian domon! Tio,

ke la eklezio ĉi tie estas kaj restas, tio vere ne estas memkomprenebla.

Ni havas grandan taskon, karaj gefratoj el poděbrada komunumo kaj el KELI. Ni estas tiel rompeblaj kaj neperfektaj! Sen Dia helpo ni neniam sukcesos. Sed ni ajn korojn alparolis la Dia amo kaj ni ricevis grandajn donacojn de la fido, kiujn ni ne meritis. Nia Sinjoro starigis nin en unu batallinio kaj donis al ni taskon de amikeco kaj frateco, taskon, kiu estas malfacila kaj belega samtempe. Ni scias, ke sen lia helpo ni ne sukcesus plenumi ĝin.

Estas belege, ke la Sinjoro Jesuo Kristo invitas nin ĉiujn komune grupiĝi ne nur ĉe lia Vorto, sed ankaŭ ĉe lia tablo. Li volas nin komune gastigi per la pano kaj vino, por ke eĉ tiuj lastaj diferencoj malaperus.

Li subtenas nin, li estas la bazangula ŝtono. Kristo, konsekrita kaj eterne fidedla.

Amen

TRI PERSONOJ

Iam estis tri personoj kies nomoj estas: Vereco, Fido, kaj Pripenso. Iun tagon ili promenis sur longa muro. Fido, ŝatinte la kvietajn paŝadojn de Vereco, decidis imiti lin pro liaj kvalitoj, sed, vidinte sinjorinon Pripenso sur siaj ŝultroj, Fido tuj ekmalekvilibriĝis.

Ja, ĉi tiu anekdoto ne estas simpla ĉar en ĝi estas vereco. Nia pripenso povas facile ŝanĝi starpunkton, sed la vereco kaj la fido ne povas ŝanĝi la starpunkton.

Verkis:

Honoré SEBUHORO

NDARIHORANYE

Eglise CEBCE Remera.

Po Box 08 Bunagana-KISORO/Ugando

Rete:honsebn@yahoo.fr

Ekumena Diservo dum la 64a IFEF-kongreso

en Herzberg ĉe Harco la 20an de majo 2012

Gvidis pastro Bernhard EICKORN kaj Siegfried KRÜGER, DE

1 Kaj kiam venis la Pentekosta tago, ili ĉiuj estis unuanime en unu loko. 2 Kaj subite venis el la ĉielo sono kvazaŭ blovego de forta vento, kaj ĝi plenigis la tutan domon, kie ili sidis. 3 Kaj al ili aperis disirantaj langoj kvazaŭ el fajro, kaj sidiĝis sur ĉiun el ili. 4 Kaj ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito, kaj komencis paroli aliajn lingvojn, kiel la Spirito donis al ili parolpovon. 5 Kaj en Jerusalemo tiam loĝis piaj judoj el ĉiu nacio sub la ĉielo. 6 Kaj kiam aŭdiĝis tiu sono, la homamaso kunvenis kaj miregis, ĉar ĉiu aparte aŭdis ilin paroli per lia propra dialekto. 7 Kaj ĉiuj konfuziĝis kaj miris, dirante unu al alia: Rigardu! ĉu ne estas Galileanoj ĉiuj tiuj parolantoj? 8 Kiel do ni aŭdas ĉiu en sia dialekto, en kiu ni naskiĝis? 9 Partoj kaj Medoj kaj Elamanoj, kaj loĝantoj en Mezopotamio, Judujo, Kapadokio, Ponto kaj Azio, 10 Frigio kaj Pamfilio, Egiptujo kaj la partoj de Libio apud Kireno, kaj pasloĝantaj Romanoj, judoj kaj prozelitoj, 11 Kretanoj kaj Araboj – ni aŭdas ilin paroli en niaj lingvoj la mirindaĵojn de Dio. 12 Kaj ĉiuj konfuziĝis kaj embarasiĝis, dirante unu al alia: Kion ĉi tio signifas? 13 Sed aliaj moke diris: Ili estas plenaj de mosto.

Agoj 2, 1-13

Diservo laŭ la Taizé-liturgio 024 en Adoru.
Aldone komuna kanto el ADORU 350: Spirito
de la vero ... versoj 1 kaj 5.

Prediko kun pensoj pri Pentekosto

Pentekosto – 50 tagoj post pasko kaj naskiĝo de la eklezio. Ni proksimiĝas al la festo kaj ankaŭ por ni Esperantistoj tiu okazaĵo estas pripensinda, speciale por ni kristanoj.

Pentekosto estas plenumo de homara sonĝo post babeligo de la lingvoj okaze de la turkonstruo laŭ la malnova testamento.

Nun post Kristo pere de la Sankta

Spirito je pentekosto okazas la kontraŭo, la liberigo el la senlingveco.

Kio estas la Sankta Spirito? Ĝi ja ne estas videbla. Komparebla kun la vento, sed sentebla nur per la efikoj. La vento de Dio estas la Sankta Spirito. Certe ankaŭ en la Spirito de Dio ĝi estas, kiel ni legas ekzemple en

Gen 1,1 (Kreado de la tero) “... kaj la Spirito de Dio ŝvebis super la akvo.”

Gen 2,7 (Kreo de la homo) “... kaj Li enblovis en sian nazon la spiron de vivo kaj la homo fariĝis viva animo.”

Nenio estas sen la Spirito de Dio, kiu ankaŭ estas en ŝtono, memkompreneble

ankaŭ en nia spirado.

En la efektivigo de Jesuo sin disvolviĝas la Sankta Spirito – la efiko de Dio. En la pekopardono ni spertas la vastecon de la Spirito de Dio.

La Sankta Spirito estas amo, karitato, pardono, espero kaj la plej grava esprimiĝo estas la amo. La Sankta Spirito efikas en kaj per homoj, ĝi estas ankaŭ komunuma spirito. Kiun spiriton sekvi, kies spirita infano esti? Kristanoj jam trovis la respondon.

Ekzistas pentekostaj spertoj, kaj similajn Esperantistoj konas. Ili scias,

ke Esperanto ne estas la Sankta Spirito, sed ĝi povas esti ties ilo.

Hodiaŭ en grandaj konferencoj okazas per teknikaĵoj simultana traduko kaj ĉiu povas aŭdi la preleganton en sia propra lingvo, kiel okazis je pentekosto. Sed ĝenerale ne temas pri la laŭdo de Dio, kio estas la novtestamenta, pentekosta travivaĵo. Ofte eĉ ĝi similas al malnovtestamenta, babela intenco, fari al si gloron.

Sed laŭdi Dion sen teknikaĵo per nia amata Esperanto certe estas pentekosta sperto. ☞



Enkonduko historia – pri la soldatoj-imperiestroj el la enkondukaj ĉapitroj por ANTOLOGIO LATINA 5

Gerrit BERVELING, NL



Publio Helvio Pertinakso

Post la morto de imperiestro Komodo (Commodus) en 192 p.Kr., la pretoria gvardio ekribelis kaj mem elektis novan imperiestron. Sed la armeoj, kiuj ŝirmis la plej minacatajn limojn de l' Romia Imperio, rifuzis agnoski tion kaj engaĝiĝis en civitana milito por antaŭenŝovi la proprajn kandidatojn. La imperiestro, kiun elektis la pretoria gvardio, estis Publio Helvio Pertinakso (P. Helvius Pertinax), senatano de ne-nobela deveno kun grandaj militistaj kaj registaraj spertoj. Fakte, tiutempe li ĵus oficis kiel Prefekto de Romo. Tuj lin akceptis la senato kiel imperiestron. Sed Pertinakso montriĝis tro memstara persono, ol ke oni lin uzu kvazaŭ

marioneton: post apenaŭ tri monatoj li estis murdita de ribela taĉmento de l' pretoria gvardio.

Markon Didion Julianon (M. Didius Iulianus) oni elektis kiel posteulon, ĉar al ĉiuj anoj de la pretoria gvardio li promesis po 25.000 sestercoj. La senpova senato nur povis aprobi tion.

Tuj sekvis ribeladoj kaj en Mezoriento kaj ĉe la Danuba fronto: Kajo Peskenio Nigra (C. Pescennius Niger), la legato pri Sirio, kaj Lukio Septimio Severo (L. Septimius Severus), la legato pri Norda Panonio, preskaŭ samtempe estis aklamitaj imperiestro. Ilin subtenis la opaj armeoj. Sekvis akra civitana milito. Juliano estis murdita; Severo konkeris Romon kaj la tronon en junio 193 p.Kr.

Lia dua edzino, Julia Domna, devena el la Siria urbo Emeso (Emessa), kie ŝia patro Basiano estis pastro de la Sunodio, komence grave influis lian politikon. Depost 202, kiam la imperiestra paro daŭre ekloĝis en Romo, la tiea gvardia komandanto Plaŭtiano forte bremsis ŝian influon. Ŝi pli kaj pli okupiĝis pri iaspeca salono koncerne kulturajn kaj religie orientitajn aferojn. Pluraj filozofoj kaj sofistoj tie brilis.

Ribelo en Britio, entreprenita de Klodio Albino (Clodius Albinus), la tiea legato, ne longe daŭris: Severo proponis al li la titolon Cezaro kaj, per tio, fakte promesis ke li estos la sekva imperiestro – kaj Klodio submetis sin, en 194 eĉ estis kun-konsulo de l' imperiestro... Efektive, nur kelkajn jarojn pli poste Severo sin sentis devigita neniigi kaj la potencon kaj la ekziston de ambaŭ Peskenio Nigra kaj Klodio Albino;

ambaŭ tro evidente rivalis al li por transprenado de la regado... Li restabiligis sian potencon en la orienta Mediteraneo, kie baldaŭ okazis iom ampleksa persekutado de kristanoj.¹

En 208 la imperiestra familio, kune kun ambaŭ princoj, faris vojaĝon al Britanio, de kie ne tre sukcesan invadon oni planis en Skotlandon. Malsano mortigis la imperiestron en 211 en York. Postsekvis lin ambaŭ liaj filoj Karakalo (Caracalla: 211-217) kaj Geto (Geta: 211-212). La amara malamikeco inter tiuj ĉi fratoj ne toleris ke ambaŭ longe postvivu la patron. Geto mortis sub nekontrolablaj cirkonstancoj. Karaktere, Karakalo iel kompareblas al kelkaj fifamaj antaŭuloj: Kaligulo, Nerono kaj Komodo: absolute neinda por regado. Por reteni sian potencon, plurfoje li draste plialtigis la pagon al la soldatoj, certigante al si ilian lojalecon.

Historie grava estas lia decido, en 212, ke al ĉiuj ne-sklavoj en la Romia Imperio, kiuj ankoraŭ ne estis Romaj civitanoj, li donis la Roman civitanecon. Tio signifas, do, ke multaj Gaŭloj, Grekoj, Maŭretanoj ktp nun subite rangis egale je la 'malnovaj' civitanoj. En la epoko mem oni apenaŭ prikomentis tion ĉi, sed pli poste tio montrigis grava.

En 213 kun sukceso li kondukis kampanjon kontraŭ la Ĝermana tribo de l' Alemanoj², kiuj minacis la Romian influon en la provinco Retio (nuna Svislando). Inspirite de siaj venkoj, en 214 Karakalo iris al Mezoriento³ por, imitante sian heroon Aleksandro la Granda (kies reenkarniĝo li sin kredis

esti), konkeri ĝin komplete. Tie, en aprilo 217, la pretoria prefekto Marko Opelio Makrino (M. Opellius Macrinus) lin igis mortigi.

Tuj la armeo rekonis Makrinion kiel novan imperiestron. La senato en Romo tuj poste same. Devene, Makrino estis Maŭretano⁴, krome li estis la unua kiu atingis la imperiestrecon sen ke anticipu li jam apartenis al la senatana rango; li estis nur kavaliro.

La ankoraŭ vivantaj membroj de la klano de Severo intertempe faris ĉion eblan por rekonkeri la imperiestrecon: ilia instiganta forto estis precipe Julia Mesa (Julia Maesa aŭ Moesa), onklino de Karakalo. Kiel tronpretendanton ŝi ŝovis antaŭen la 14-jaran Varion Aviton Basianon (Varius Avitus Bassianus), la filon de ŝia filino Julia Semia (Soemias). La egan plimulton de l' Siria armeo ili konvinkis akcepte hurai lin kiel imperiestron, sub la adoptita nomo de Marko Aŭreliano Antonino (M. Aurelianus Antoninus). Makrinion bataleje oni venkis kaj mortigis en junio 218.

Do, 14-jara, Basiano estis imperiestro de Romo! Knabo el tute Mezoriento fono, kiu neniel komprenis la etoson nek la tradiciojn Okcidentajn. Li estis hereda ĉefpastro de Dio Elegabal⁵ en la urbo Emeso; antaŭ li ankaŭ lia praavo Julio Basiano jam estis estinta pastro de la sama Dio. Kiel oficialan imperiestran nomon li adoptis la saman nomon: Elegabal, Grek-Latine Heliogabalus. Ĉar nun li devas regi en Romo, la Siria junulo tien transloĝiĝis; sed la Nigra Ŝtono, kiu simbolis lian Dion Elegabal, por li estis tro sankta; tiun li tien do

kunprenis kun si. Ĉe la Romaj senatanoj li vekis nur indignon, instalinte sur la Palatinon la Orientan sensualan kulton por sia Dio, en kies orgioj kun plena sindediĉo li partoprenadis.

Efektive, la regadon de l' Imperio prizorgis lia avino, Julia Mesa. Tio ne povis daŭri senfine. Kreskis la antagonismo inter la malromia-etosa imperiestro kaj la senato de Romo. Julia konvinkis Elegabalon, ke plej saĝe li adoptu kiel filon kun rajto je posteuleco sian kuzon Aleksiano, filon de Julia Mamea, sub la adopta nomo de Marko Aŭrelio Aleksandro. Tio okazis ĝustamomente – en 221 p.Kr. Jam la sekvan jaron la pretoria gvardio murdis Elegabalon, kies ekstravagancojn la Roma publiko ne plu eltenis.

Sen iu ajn problemo, Aleksandro fariĝis la nova imperiestro – kun la nomo Aleksandro Severo (M. Aurelius Alexander Severus, 222-235). La Sanktan Ŝtonon oni sendis returne al Sirio.

Efektive, la apenaŭ 14-jara Aleksandro ne mem regis la ŝtaton; tion faris por li la pretoria prefekto Ulpiano (Ulpianus), fama juristo, kune kun la avino kaj la patrino de l' nova Aŭgusto. Aleksandro volis adori ĉiujn Diojn de la tuta Imperio, laŭ la Panteon-idealo de Hadriano. Ankaŭ Kriston li adoris en sia hejma kapelo⁶.

La Nova Persa Imperio, kie la



Aleksandro Severo

Zoroastra⁷ religio travivis fundan renesancon, en 230 kaj 231 kondukis al problemoj: pro sia naciismo ĝi arogis al si la estradon super ĉiuj teritorioj, kiuj iam ajn apartenis al la Praa Persa Imperio. Fenomeno konata ankaŭ en nia nuntempa mondo. Tio implicis ankaŭ invadon en la Romian Mezopotamion kaj atakojn kontraŭ Armenio. Aleksandro plurfoje devis batali kontraŭ ili, sed sen multa sukceso. En 233 li hastis okcidenten, ĉar atingis lin katastrofa novaĵo pri atakoj fare de la Alemanoĵ ĉe Rejno kaj Danubo. Kiam li sin montris preta por intertraktado kun la Ĝermanaj triboj anstataŭ rekte nur ataki iliajn armeojn, ekestis ribelo gvidata de Traca oficiro, Kajo Julio Vero Maksimino. Kaj Aleksandron kaj Mamean oni ekzekutis.

Post la morto de Aleksandro Severo la ĥaoso kreskis ture: ĉiuflanke eksturmis la t.n. barbaroj: Ĝermanoj transiris Rejnon kaj Danubon; Persoj Eŭfraton. Ĉu tio estis sekvo aŭ kaŭzo de la fenomeno de l' soldatoj-imperiestroj? Kelkfoje eĉ ekzistis da ili pliaj samtempe. Aŭ ĉu por la barbaroj estis nur tre facile penetri en Imperion, kies imperiestroj ŝajne havis neniun hobion aŭ taskon krom reciproke sin ataki kaj ekstermi?

¹ Tertuliano S en 197 p.Kr. S aludas al la tiama politika situacio en *Apoloĝio* 35:9: Sed, de kie do devenas la Kasioj kaj la Nigroj kaj la Albinoj? de kie do, kiuj inter la du laŭroj insidas Cezaron? de kie do, kiuj por sufoki lian gorĝon ekzercas sin en palestro?

² Eble estas interese, atentigi pri tio, ke por *Germanoj* en multaj lingvoj oni uzas tute malsamajn esprimojn, ĉefe pro tio, ke popoloj kiuj loĝis ĉirkaŭ la Ĝermanaj popoloj, kiuj de ekstere estis konsiderataj kiel iu kohera tutaĵo, ekzistis foje por la tutaĵo la esprimon, kiu indikis la por ili plej apudan Ĝermanan popolon; tiel, ekzemple, en la Franca oni parolas pri *Allemagne* laŭ la *Alemanoĵ*.

³ En 215 okazis sub lia influo sanga kristan-persekutado en Aleksandrio Egipta, dum kiu Origeno estis devigita fuĝi al Palestino.

⁴ De tiu ĉi vorto devenas la nocio *Maŭroj*.

⁵ Etimologie: *Allah haĜabal* = Dio de l' monto. Vidu *La Vivo de Elegabal* de Elio Lampridio (VoKo 2011), ankaŭ ĉi-volumo.

⁶ Tia religia malfermiteco (aŭ emo je sinkretismo, laŭ kontraŭuloj) iel apartenis al la familio: Julia Domna portis plurajn religie sonantajn kromnomojn, i.a. Ceresa, Proserpina kaj Roma Junona, kaj en sia *salono* ŝi ofte konversaciis kun reprezentantoj de nov-platonismo kaj nov-pitagorismo, kiuj ambaŭ estis mistike influataj. Foje, laŭdire, iel ŝi ekposedis la memorarojn de Damis, la fidela akompananto de Apolonio el Tiano (*Tyana*), fama mago, miraklofaranto kaj filozofo (ĉ. 0 - ĉ. 93 p.Kr.), kiun kelkaj sekvantoj komparis aŭ similigis je Jesuo Kristo. Al la Greklingva verkisto Filostrato (170-245 p.Kr.) ŝi taskigis fari el ĝi pli prezentindan version por larĝa publiko: rezultas la konata oklibra Greke verkita *Vivo de Apolonio de Tiano*. Ankaŭ Karakalo estis tre ĉarmita de Apolonio. Kaj kuzino de Julia Domna, Julia Mamea, venigis la teologon-ekzegeziston Origeno al Antioĥio por iom pli funde ekscii ankaŭ pri kristanismo.

⁷ La profeto Zoroastro estas datumita inter 1400-600 a.Kr. La fakuloj komplete ne akordiĝas. Lia religio – frua formo de monoteismo aŭ prefere: dualismo (Dio de bono – Dio de malbono) – influis eĉ plurajn tekstojn en la Hebrea Biblio. Li ankaŭ nomiĝas Zaratuŝtro.

Henk de Hoog – Andreo Cseh 5

Kion rakonti al la melkistino?

Redaktis Ed BORSBOOM, NL

*E*n Nederlando dum 1945 furoris la anglalingva gazeto “*The Liberator*”. En ĝi De Hoog, kiu specialiĝis en la angla lingvo kaj poste instruis ĝin, publikigis analizon de federalismo kaj poste tradukis el ĝi en Esperanton la artikolon “Kion rakonti al la melkistino?” La enhavo pritraktas la problemon de miskomprenoj ĉe eŭropanoj pri Usono. Cseh aperigis la tekston en la IEL-UL gazeto “*La Praktiko*” nr 1-5, 1946.

En Nederlando LEEN estis la neŭtrala e-a grupo, FLE la laborista. IEL estis la antaŭa UEA. Universala Ligo (UL) estis la nova iniciato de Cseh.



Andreo Cseh, 1936

Hago, 1945-09-06

Al s-ro De Hoog,

Ricevinte vian leteron de la 2-a de septembro, mi sendas al vi, ankaŭ en la nomo de ges-roj Isbrucker, koran gratulon pro via bonega artikolo [pri federalismo] en la *Liberator*, kaj gratulon ankaŭ pro via sukceso, ke la gazeto publikigis ĝin. Kun ĝuo mi legis vian artikolon.

Kun koraj liganaj salutoj, A. Cseh

Amsterdam, 1945-09-16

Al s-ro Cseh,

Mia *Liberator*-a artikolo vekis la atenton de precipe amsterdamaj samideanoj el la LEEN-grupo. Mi ricevis kelkajn leterojn i.a. de magistro Kalma, kiu invitis min viziti la proksiman kunvenon de la spertula grupo de LEEN. Mi akceptis la inviton. Supozeble ke en tiu kunveno oni demandos min pri UL kaj mi ŝatus eviti erarojn. Por mi mem mi elmeditis sekvantan komparon.

La esperantistoj estas organizitaj en multegaj grupoj laŭ vivkoncepto, klas-interesoj, religio, fak-interesoj ktp. Esperantujo tamen **malhavas**, sed sendube

nepre **bezonas** “ŝtatan” organizon kiu ĉirkaŭprenas la tutajn. Esperantisto povas esti membro de FLE, LEEN, IEL, UEA, NOSOBE aŭ de du aŭ tri el tiuj grupoj samtempe, sed krom tio li fariĝas UL-ano.

Ĉu vi aprobas tian manieron de prezentado de la nova ligo?

Samideane, H. De Hoog

Hago, 1945-09-22

Al s-ro De Hoog,

Via teorio pri la pozicio de UL estus bonega, se ĝi trovus komprenon kaj aprobon de la IEL-tendaro. Sed tion mi ne antaŭvidas, ĉar la IEL-gvidantaro havas la starpunkton, ke IEL mem estas tiu universala “ŝtato”, en kiu ĉiu alia [esperanta] organizaĵo havas sian lokon. Ekzemple la fakligoj (TAGE, KELI ktp), kiuj estas “kunlaborantaj” kun IEL, konservante sian plenan memstarecon. Laŭ mia opinio nur tiel ni povos kontentigi la IEL-estraron, se ni diros, ke oni rigardu UL-on kiel fakorganizaĵon.

Kun kora saluto, A. Cseh

Amsterdam, 1945-11-03

Al s-ro Cseh,

Ĉi kune mi sendos al vi *La Liberator*-on kun ĉarma artikolo “*Kion rakonti al la melkistino?*” Ĉu ĝi ne estus bona por “*La Praktiko*”. Mi pretas prizorgi tradukon. Ĝuste UL volas akceli la amikajn rilatojn inter la “ordinaraj homoj”.

Kore salutante, H. De Hoog

Hago, 1945-11-06

Al s-ro De Hoog,

La artikolo pri la melkistino estas tre bona kaj certe taŭga por “*La Praktiko*”. Bonvolu do prizorgi la tradukon. Antaŭdankon.

Se vi trovas aliajn artikolojn taŭgajn en aliaj gazetoj, kiujn vi regule aŭ okaze legas, bonvolu proponi ilin por traduko.

Samideane kaj amike, A. Cseh

Fragmentoj el

Kion rakonti al la melkistino?

Oni rakontas, ke [en 1944] normanda melkistino restis melkanta sian bovinon, dum ĉie ĉirkaŭ ŝi jankioj kaj nazioj batalis sur la paŝtejo. La melkistino ne demandis kiajn armilojn uzas la soldatoj, ŝi nur aŭskultos avide, se oni rakontas al ŝi, kiel la melkistino en Montana pasigas sian dimanĉon.

Oni devus rakonti al eŭropanoj, kiel amerikanoj reale vivas. Ili devus scii, ke ne ĉiu bonstata amerika familio havas naĝbasenon, sed ke la junuloj iras al la malnova naĝloko en la rivereto inter la herbejoj.

Ili devus aŭdi pri la amerikaj preĝejoj, ne tiom pri la grandaj katedraloj, kiel la “katedralo de S-ta Johano la Dia” en Novjorko, kiom pri la humilaj blankaj lignaj konstruaĵoj, per kiuj ĉiu vilaĝo estas dotita. Ke sakristiano de la Kongregacia Eklezio en la ŝtato Vaŝingtono estas en multaj rilatoj identa kun la sakristiano de Villers-sur-Eure en Francujo.

Oni devus rakonti, ke la Evangeliistoj en la ŝtato Iowa agas preskaŭ precize kiel la Redempcionistoj en Belgujo, ke predikisto en Columbus, Ohio, estas la spirita du-ulo de la predikisto en Hilversum, Nederlando.

Ili devus scii, ke la hodiaŭaj amerikaj trajnoj tre aspektas ruliĝantaj porpatrinaj hejmoj kun miloj da junaj patrinoj, kiuj prenas siajn novnaskitojn, kies patro estas en la armeo, por viziti la geavojn.

Oni devas rakonti, ke amerika parko estas kiel eŭropa parko. Ke ĝi estas plena de amantoj, de afablaj maljunuloj, de infanoj, de glaciaj-vendistoj kaj de bonvolaj policanoj. Ke en dimanĉaj posttagmezoj homoj promenas tie en siaj plej bonaj vestoj kaj amikinoj fotografas unu la alian.



Paŝtejo kun brutaro. Pentris Karel Dujardin


Ciamverda estas la temo: bele maljuniĝi. Mi aŭdis pri ĉarma ideo okaze de la 60 jara naskiĝtago de konata verkisto, ke en la amika societo li ricevis belan karton sur kiu estis la teksto: Estas facile al vi, vi jam havas malantaŭ vi kio estas malfacila. Sed sur la dorsa flanko staris: Atentu, nun sekvos, kio estos malfacila! Mi, kiu jam bone konas la temon mi jesas, ĉi tiun spritaĵon. Mi kolektis kelkajn elstarajn saĝaĵojn pri la maljuneco – por pruvi kiel bone ni povas spritadi pri la lasta akto.

- Nenio pli rapide maljunigas ol la timo, ke ni maljuniĝas rapide.
- Se vi envias gejunulojn pro tio vi ne estos pli juna, sed vi plimultigas la afliktojn de la maljuniĝo.
- Ĉiu deziras vivi longe, sed neniu deziras maljuniĝi.
- Pli malmultaj estas tiuj, ĉe kiuj la animo supervivas la korpon, ĉe la plimulto la korpo supervivas la animon.
- En nia infanaĝo ni amas nian familion, kiel plenkreskuloj nian patrujon, kaj en nia maljuna aĝo jam la tutan homaron.
- La maljuneco malrapide venas, sed rapidigas ĝian alvenon malsano kaj malfeliĉo.
- La maljuneco en si mem ne retenas nin de ĉiu stultaĵo.
- La junece maljunulo estas utila, sed la frumaljuna junulo estas malutila.
- Pli malfacile estas por tiuj, kiuj supervivas la forpasintojn.

Jen kelkaj hungaraj popolaj proverboj

- Ĉiuj kulpoj ekdormas en la maljunulo nur la avareco vekigas.
- Estas bone ripozi sub la ombro de maljuna arbo.
- Maljunan lupon eĉ malgranda ŝafido priridas.

Sufiĉas tiom da citaĵoj, utilas al ni, se ni iom ekstaras ĉe tiu citaĵo, kiu pli proksime tuŝas nin. Tion mi jam apenaŭ kuraĝas proponi, ke tiun tekston rigardu gejunuloj kaj ili elektu kiu citaĵo pleje rilatas al ni – gemaljunuloj.

Eblas lerni el la homaj saĝaĵoj eĉ ridi pri ili, sed evangelion fine nur la Biblio diras al la gemaljunuloj. Unue ni citu en memoron la grandan renkontiĝon: ”*kiam vi estis juna vi zonis vin, kaj iris, kien vi volis; sed kiam vi maljuniĝos, vi etendos viaj manojn, kaj alia vin zonos, kaj portos vin, kien vi ne volos.*” /Joh. 21,18/. Tio unuavice estis dirita al unu persono, sed estas valida ankaŭ ĝenerale: la maljuneco kunportas la striktiĝon de la vivo. Se tion ni akceptas silente kaj obeeme, tiam povas eksoni la konsola evangelio. Mi citas du ”grandajn” Vortojn. En ambaŭ la evangelio kuraĝigas la maljunulojn: 1) ”*Ili verdestas en la kortoj de nia Dio. Ili floras ankoraŭ en la maljuneco, estas sukplenaj kaj freŝaj*” /Psalm 92,14/. Pli striktaj ja estas la kadroj, sed el la esenco nenion ni devas ĉesigi tial, ĉar ni maljuniĝis. Ankaŭ Dio nenion ĉesigas. 2) ”*Ankaŭ ĝis via maljuneco Mi estos la sama, kaj ĝis via griziĝo Mi vin portos.*” /Jes.46,4/ 

Sekretaria raporto 2011-2012

Pavel POLNICKÝ, CZ

Karaj gefratoj, kutime Vi povas legi en la 3-a n-ro de Dia Regno sekretarian jarraporton. Sed pri kio mi povas informi Vin, se mi ricevis dum pasinta jaro neniun informon, raporton, sciigon aŭ mesaĝon.

Jes, kompreneble Vi regule kaj ĝustatempe ricevas nian gazeton Dia Regno, kiun mi kontrollegas kaj post la eldono dissendas ĝin al Vi, niaj abonantoj. Same mi kunlaboras dum preparo de nia kongreso, kiu post kelkaj semajnoj okazos en Germanio. Kompare kun kelkaj aliaj asocioj tio estas bonega aktivado, sed mankas al mi informoj pri loka kaj persona agado. Mi esperas, ke tamen dum la jarkunveno ni aŭdos kelkajn informojn.....

Tagordo por la jarkunveno de KELI 2012

- 1 Malfermo
- 2 Elekto de kunprotokolantoj
- 3 Akcepto de la tagordo
- 4 Komunikoj
- 5 Funebra memorigo
- 6 Sekretaria jarraporto
- 7 Kasista jarraporto
- 8 Raporto de la kaskontrolantoj
- 9 Diskuto kaj akcepto de la raporto
- 10 Buĝetoj
- 11 Raporto de la redaktoro de DR
- 12 Estrarelekto
- 13 Kongresplanoj
- 14 Proponoj kaj sugestoj de la membroj
- 15 Fermo

Klarigoj:

- (12) *Ĉi-jare finiĝas la 3-jara deĵor-periodo de la redaktoro Bengt Olof Åradsson kaj de la estrarano Zoltán Somhegyi. Ambaŭ estas reelekteblaj*
- (13) *Venis nur propono por komuna kongreso IKUE kun KELI kiu devas esti pritraktata.*

Financa raporto de KELI 2011 (Ĉiuj sumoj en EUR)

		Bilancoj fine de la jaroj	
		2010	2011
Aktivoj			
	Stokoj de libroj	5.604,10	5.260,75
	Stoko de kasedoj, E-Misio	<u>116,00</u>	<u>116,00</u>
	<i>Provizo</i>	5.720,10	5.376,75
	Postuloj (IKUE, UK-lukosto)	0,00	70,00
	Kasista kaso	7,20	77,99
	Sekretaria kaso	527,00	44,00
	CIC ĝir-konto (antaŭe ING)	2.953,70	799,47
	CIC ŝpar-konto (antaŭe ING)	34.728,08	36.351,05
	UEA-konto kelk-p	<u>2.786,46</u>	<u>6.041,93</u>
	<i>Monrimedoj</i>	41.002,44	43.761,44
	Sumo de aktivoj	46.722,54	48.761,19
Pasivoj			
	Kapitalo	9.893,67	18.172,59
	Saldoj negativa/pozitiva	<u>1.271,40</u>	<u>450,55</u>
	<i>Kapitalo entute</i>	11.165,07	18.623,14
	Dumvivaj membroj	2.327,64	2.327,64
	E-Misio	6.894,51	6.894,51
	Helpa kaso	3.312,60	3.412,60
	Kongresa rezerva kaso	1.813,48	1.823,48
	Literatura/Himnara kaso	<u>12.959,57</u>	<u>12.941,57</u>
	<i>Fondusoj entute</i>	27.307,80	27.399,80
	Evidente	314,00	603,00
	Sekretariaj kostoj	60,00	0
	Kreditoroj (brita kaso)	95,25	95,25
	KELI-abonoj de EK	12,50	0
	Kongresaj kotizoj	360,00	1900,00
	Antaŭricevitaj kotizoj	<u>355,40</u>	<u>140,00</u>
	<i>Transitaĵoj kaj pasivoj</i>	1.197,15	2.738,25
	Sumo de pasivoj	46.722,54	48.761,19

Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2011-12-31

Aktivoj

Stokoj: En la lastaj tri jaroj la vendado de la stokoj entute estis ĉirkaŭ 6 procentoj. Estus bone trapensi la veran valoron de nia stoko, kaj eble pli multe sendi al malriĉaj, ne forte kristanaj landoj per la uzado de Literatura / Himnara kaso.

Postuloj: Laŭ la multjara kutimo KELI pagis la lu-koston de la salono dum la Universala Kongreso, ĉijare 140 EUR. La duono de la kosto apartenas al IKUE, kaj je 25a de januaro 2012 IKUE pagis tion (70 EUR).

Monrimedoj: Sekretaria kaso estas ĉe Pavel Polnicky CZ, kiu zorgas pri la presado kaj dissendado de DR. Dum la jaro 2011, pro la ŝanĝo de la sidejo, KELI ŝanĝis ankaŭ bankon. Ni fermis la konton en Nederlando ĉe ING kaj malfermis novan bank-konton en Francio ĉe CIC banko.

Pasivoj

Kapitalo: La estraro decidis, ke estonte la legacojn ni montros aparte dum tri jaroj. Estis decidita, ke kune kun la sumo de la Informada/Varbada kaso, ankaŭ la legacoj estu montritaj en la sumo de la Kapitalo. La rezulto de la jaro 2011 estis 450,55 EUR.

Fondusoj: La estraro decidis, ke estas vane aparte montri la sumon de la Junulara helpa kaso, ĝi estu kunigita kun la sumo de la Helpa kaso. La helpa kaso estas por helpo al nepagipovaj membroj partopreni kongreson. En 2011 ni subtenis kelkajn personojn.

Transitaĵoj kaj pasivoj:

Evidente: 603 Eurojn la membroj donacis al Evidente je la fino de la jaro. La sumo jam estas transkontigita al la fonduso Zienderogen. La brita sekcio pagis antaŭ jaroj 95,25 EUR, ni atendas de ili la konkretan celon de tiu ĉi mono. Kongresajn kotizojn (1.900 EUR) kaj membro-kotizojn (140 EUR) al la jaro 2012 kelkaj membroj jam pagis en la jaro 2011.

Rezulto 2011 kaj buĝetoj 2012 kaj 2013 (Ĉiuj sumoj en EUR)

	Buĝeto 2011	Rezulto 2011	Buĝeto 2012	Buĝeto 2013
Enspezoj				
Kotizoj/Abonoj	2.500	2.530,31	2.700	2.750
Kotiz- kaj kursdiferencoj	10	0		
Adopta Kaso	600	914,47	600	700
<i>Kotizoj entute</i>	<i>3.110</i>	<i>3.444,78</i>	<i>3.300</i>	<i>3.450</i>
Librovendado	300	363,37	100	100
Rentumoj	600	621,68	600	600
Profito el kongreso	500	321,00	100	200
<i>Aliaj enspezoj</i>	<i>1.400</i>	<i>1.306,05</i>	<i>800</i>	<i>900</i>
Enspezoj entute	4.510	4.750,83	4.100	4.350
Elspezoj				
Presisto kaj sendado de DR	3.000	2.959,00	3.100	3.200
Perantoj	20	5,00	10	10
<i>Revuokostoj</i>	<i>3.020</i>	<i>2.964,00</i>	<i>3.110</i>	<i>3.210</i>
Prezidanto	30	20,00	20	20
Sekretario	70	60,00	65	70
Redaktoro	300	550,00	250	250
Kasisto/Matrikulisto	40	27,43	20	20
<i>Estrarkostoj</i>	<i>440</i>	<i>657,43</i>	<i>355</i>	<i>360</i>
UEA-kotizo	60	61,00	60	60
Ĉambro de Komerco	27	26,64	0	0
Kaskontrolo	50	54,90	200	50
Bankkostoj	40	36,31	120	130
Merituloj	60	83,45	50	60
UK Lukostoj	80	70,00	70	70
<i>Ĝeneralaj kostoj</i>	<i>317</i>	<i>332,30</i>	<i>500</i>	<i>500</i>
Librovendado (kostoj)	150	343,35	90	90
Varbado (Inf./varba kaso)	20	0,00	20	20
Rabatoj de Perantoj	15	3,20	10	10
<i>Aliaj elspezoj</i>	<i>185</i>	<i>346,55</i>	<i>120</i>	<i>120</i>
Elspezoj entute	3.962	4.300,28	4.085	4.060
Saldoj	548	450,55	15	290

Klarigoj pri la rezulto 2011 kaj la buĝetoj 2012/2013

Enspezoj

Kotizoj:

La Kotizoj estis precize planitaj, sed al la Adopta kaso alvenis pli da mondonaco. La Adopta Kaso estas mondonaco de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Ili estas petataj kontribui “laŭforte”. Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacoj. En 2011 enfluis 914,47 EUR.

Aliaj enspezoj:

La sumo de Librovendado kaj Rentumoj estis pli alta ol la planita sumo, sed la Profito el kongreso pli malalta.

Elspezoj

Revukostoj: La kostoj de Dia Regno enhavas kaj la presadon kaj la dissendadon.

Estrarkostoj: La kostoj de la Redaktoro kovras du jarajn kostojn, la aliaj kostoj ĉiuj estis malpli ol la planitaj kostoj.

Ĝeneralaj kostoj:

Tiu ĉi kategorio enhavas UEA-kotizojn, la kotizon de la Ĉambro de Komercio en Nederlando, la kostojn de la kaskontrolo, bank-kostojn, apogon de merituloj kaj UK lukostojn.

Aliaj elspezoj: La kosto de la librovendado estis pli ol planita, sed enhavas ankaŭ la jaron 2010.

Saldoj:

La saldo de la jaro 2011 (kvankam estas malpli ol planita), kaj la planita saldo al la jaroj 2012 kaj 2013 montras, ke la financa bazo de KELI daŭre estas kontentiga.

La kaskontrolo okazis en Stuttgart. Ĉeestis (de maldekstre) Siegfried Krüger, Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Karl-Heinz Schaeffer, Markus Holzapfel.



Sankta Semajno en Bonn

Raportas Franz-Georg RÖSSLER


Jam la 28an fojon okazis Printempa Semajno Internacia, paskatempa semajno por la tuta familio. En tiu ĉi jaro gastigis ĝin Domo Venusberg en Bonn (D), klerigejo de la arkdiocezo Kolonjo; kunorganizis la Laborunuiĝo de Katolikaj Esperantistoj en la diocezo Speyer. Tial memkompreneble preĝohoroj kaj diservoj apartenis al la programo.

Ĉiutage Georg Weil gvidis la Mateanan laŭdon. Por la fino de la semajno pastro Kronenberger aliĝis. En la Sankta Ĵaŭdo li celebris la instaladon de la Eŭĥaristio. En la Sankta Vendredo li

memorigis pri la morto de Jesuo, kaj sabate – post la rita paska fajro – li festis per la liturgio de la Paska Nokto la Resurekton. Enplektiĝis ankaŭ aliaj kristanoj, eĉ nekredantoj. La muzikon prizorgis la geedza paro Rössler. Bazo por la preĝoj kaj la kantoj estis Adoru, la ekumena diserva libro.

Tiuj religiaj ofertoj montriĝis kaj edifaj por la ĉeestantoj kaj nepraj atestoj pri kristana vivo, praktiko kaj kulturo kadre de sekulara ĉirkaŭaĵo, kies semajna gvidlinio estis la sorĉista mondo de Harry Potter.

☪



Somerumu!!

Loga programo en la franca Esperanto-kastelo Greziljono

Somera programo kun 4 laŭtemaj semajnoj. Resumo interrete: gresillon.org/somero

- **julio-21/28:** Art-amatora semajno kun teatro, muziko, dancoj, kantoj, korpomovoj kaj intensaj kursoj. Informoj interrete: gresillon.org/s1
- **julio-28/aŭgusto-04:** Alternativa semajno kun verd-politika seminario kaj E-kursoj; por vegetaranoj, verduloj, ekologio-ekonomiko-alternativuloj, naturistoj kaj tendumantoj. Informoj interrete: gresillon.org/s2
- **aŭgusto-04/11:** Turisma kultura semajno, kursoj de franca lingvo kaj Esperanto antaŭtagmeze, ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro posttagmeze. Informoj interrete: gresillon.org/s3
- **aŭgusto-11/20:** Pupteatra festivalo por infanoj, junuloj, familioj. Farado de manpupoj kaj vesperaj spektakloj kun Christoph Frank. Muziko, gitaro, sporto, ludoj kaj E-kursoj. Informoj interrete: gresillon.org/s4

Kontaktoj: kastelo@gresillon.org, +33-241 89 10 34, www.gresillon.org
Adreso: Gresillon, 49150 SAINT MARTIN D'ARCE, France
Jara agendo: gresillon.org/agendo

Olavi Kantele forpasis

Nia KELI-membro kaj frato, Olavi Kantele el Finnlando, forpasis en majo post mallonga, sed severa malsano.

Nekrologo venos en sekvonta numero.

PLI PRI JESUO – More about Jesus

*Unua strofo de la himno
de Eliza E. Hewitt*

*Pli pri Jesu' sciiĝu mi,
Lin al aliaj montru pli,
Pli lian savon vidu jam,
Pli da ĝismorta lia am'*

Refreno:

*Pli, pli pri Jesuo!
Pli, pli pri Jesuo!
Pli lian savon vidi jam,
Pli da ĝismorta lia am'!*

melodio de SWENEY

Eliza E. Hewitt naskiĝis 28 junio 1851 en Pensilvanio. Ŝi mortis 24 aprilo 1920. Post eksameniĝo ŝi instruis, sed pro spina problemo ŝi ne povis daŭrigi kaj ŝi komencis verki kristanajn himnojn sub la kaŝnomo de Lidie H. Edmunds.

